



# La Edzo

Shen Congwen

elĉinigiŝ Vejdo

e-librigita de Elerno

aprilo, 2006

La printempa pluvo daŭris sep tagojn. La rivero ŝvelis.

Sur la ŝvelinta rivero, la opio-fumaj kaj bordelaj boatoj, kiuj kutime ankrumis ĉe strando, nun ripozas tuj de la bordo, ligate al palisoj de palafitoj.

Ĉe la fenestro fronte al la rivero, la trinkantoj en la palafita te-salono povas ĝui la belan pejzaĝon de la pagodo trans la rivero, kaj ankaŭ vidi kiel virinoj bruligas opion por siaj klientoj en boatoj. Pro proksimeco inter palafita te-salono kaj boatoj, konatoj povas interŝanĝi salutojn de supre kaj de malsupre; poste ili renkontiĝas kaj ekbabilas intime, eĉ malĝentile; fine tiu en palafito pagas koston de teo, trairas la malsekan kaj fetoran koridoron kaj aliajn malpurajn lokojn kaj surpaŝas boaton.

Paginte duonan ĝis kvin jŭanojn, li povas laŭplaĉe fumi kaj dormi kaj senbride diboĉi kun virino. Tia juna kaj korpulenta virino servas al viro nokte en boato per sia virina avantaĝo.

Kiel aliloke, la boatanoj nomas tion "okupo". Virinoj venas ĝuste por tiu okupo. Laŭ la nomo, tiu profesio, same kiel aliaj okupoj, nek staras kontraŭ moralo nek malutilas al sano. Tia virino forlasas sian vilaĝon, agrikulturistan familion, ŝtonmuelilon kaj bovidon, kaj la sinon de sia juna kaj fortika edzo kaj iras, kune kun konato, en boaton por la okupo. Iom post iom ŝi al kutimiĝas al urbaneco, forgesas la vilaĝan vivon kaj havigas al si malvirton necesan nur en urbo, tiel ŝi pereas. Tamen neniu donas atenton al tiu perejo, ĉar ĝi estas malrapida kaj estiĝas post multa tempo. Kaj plie ne mankas tiaj virinoj, kiuj ĉiukaze konservas sian kampulinan kvaliton, tial tute ne mankas la provizo de junulinoj, kiuj volonte servas en la bordelaj boatoj.

Se virino, kiu ne sentas haston naski infanon, venas ĉi tien kaj ĉiumonate sendas monon de ŝi akiritan dum du noktoj al sia honesta kaj laborema terkultura edzo, li, siaflanke, povas vivi pli bone. Tio neniom damaĝas lian reputacion kaj intereson. Tial multaj junaj edzoj, post la geedziĝo, forsendas siajn edzinojn al urboj kaj mem restas hejme por vivi honeste. Tion oni eĉ konsideras ekstreme ordinara afero.

Kiam tia edzo sopiras al sia juna edzino, aŭ kiam li volas vidi ŝin dum festotagoj, li do vestas sin pure kaj rapidas al la urbo, kun la pipo ĉiam ĉe la talio kaj kun korbo plena je batatoj kaj kukoj el glua rizo sur la dorso. Kvazaŭ por viziti malproksiman parencon, li petas informon pri ŝia adreso de la unua boato ĉe la kajo ĝis kiam li trovas la boaton, sur kiu lia edzino laboras. Ascendinte la boaton, li zorgeme metas siajn tolsuojn sur lignotabulon ekster la kajuto kaj, doninte la korbon al la virino, li ŝin ekzamenas de la kapo ĝis la

piedoj, kun mira rigardo. En la okuloj de la edzo, la virino nun estas tute malsama ol antaŭe.

La edzo el la kamparo certe sentas grandan miron pro ŝiaj brile pomadita hartubero, beligitaj brovostrioj, pudrita vizaĝo, urbanaj agmaniero kaj vestado. Ŝi tre facile legas lian stultecon. Post momento, ŝi demandas: “Ĉu vi jam ricevis 5 jŭanojn?”, “Ĉu nia paro da porkoj jam naskis idojn?” Kompreneble, ŝia parolmaniero fariĝas libera kaj senĝena kiel urbaj sinjorinoj.

Aŭdinte ŝin demandi pri la mono kaj porkoj, la edzo sentas, ke eĉ en la boato li ankoraŭ ne perdas mastrecon kaj ŝi ankoraŭ ne tute forgesas sian hejmon en la kamparo. Li ekhavas pli da kuraĝo kaj malrapide elprenas la pipon kaj silikon. Subite la virino forkaptas lian pipon kaj ŝovas cigaredon de fama marko en lian manon kalan kaj dikan, tio aliafoje mirigas lin, sed nur momente. Poste la edzo ekfumas kaj ekparolas...

Post la vespermanĝo, li ankoraŭ fumas la cigaredon kun freŝa gusto. Tiam venas kliento — probable boatposedanto aŭ komercisto — en bovledaj botoj kaj kun brile arĝenta ĉeno montrata el sub la monzono ĉe la talio. Ebriiĝinte, li ŝanceliĝe eniras la boaton kaj krie postulas kisojn kaj plezuron en lito. Liaj obtuza kaj surdiga voĉo kaj barbara konduto pensigas al la edzo arogantecon de vilaĝestro aŭ grandsinjoroj. Sen atentigo la edzo englitas timeme en la postan kajuton kaj kaŝiĝas tie. Bruete spirante li deprenas la cigaredon de la buŝo kaj sencele rigardas la krepuskan pejzaĝon sur la rivero.

La brilantaj lampoj sur la bordoj kaj en boatoj donas tute alian fzionomion al la nokta rivero. Tiam lia menso vagas al kokoj kaj porkidoj en sia hejmo, kvazaŭ nur ili estus liaj amikoj kaj karuloj. Nun kvankam li estas ĉe sia edzino, tamen for de sia familio. Li eksentas iom da soleco kaj preferas reveni hejmen.

Ĉu vere hejmeniri? Ne, neeble. Sur la vojo longa je 15 kilometroj li renkontus ŝakalon aŭ leopardon aŭ patrolantajn gardistojn — ĉiuj estas teruraj. Kaj krome la boatmastrino retenos lin kaj invitos lin al teatro kaj te-salono. Kaj ĉar li jam estas en la urbo, li ne devas ne ĝui lampojn sur stratoj kaj spekti urbanojn. Li do restas kaj atendas la alvenon de la boatmastrino en la posta kajuto, amuziĝante per rigardo de la nokta pejzaĝo sur la rivero. Kiam la invito alvenas, li ĉirkaŭiras la kajuton kaj surbordiĝas. Post amuziĝo, li katpaŝe enboatiĝas per la sama vojo, por ne ofendi la enlitan opiofumanton.

Estas tempo enlitigi, kiam aŭdiĝas tamburado de nokta gardisto ĉe la okcidenta monteto en la urbo. Vidante tra fendo en la septo, ke la kliento ankoraŭ ne foriras, la edzo senvorte enrampas sub la novan litkovrilon en la posta kajuto kaj dormas sola. Noktomeze, kvazaŭ en sonĝo aŭ en sendormeco,

li aŭdas sian edzinon engliti kaj demandi, ĉu li volas kandon. Ŝi ne forgesas lian tiun ŝaton. Kvankam li diras, ke li jam enlitiĝis aŭ li jam prenis iom, tamen ŝi ankoraŭ enŝovas peceton en lian buŝon. Poste ŝi foriras kun plendeta mieno. Ŝajnas, ke nur pro tiu kandoppeceto en sia buŝo la edzo devas indulgi sian edzinon. Li lasas sian edzinon servi al la kliento en la antaŭa kajuto, dum li endormiĝis trankvile.

Tiaj edzoj multas en la vilaĝo Hŭangĝŭang. Tie produktiĝas fortikaj virinoj kaj honestaj viroj. Virino forlasas la vilaĝon kaj prostituas sin, kaj ŝia edzo bone scias kian profiton ŝi alportos. Li komprenas, ke ŝi ankoraŭ estas lia edzino, kaj la de ŝi naskota filo kaj parto de la de ŝi lukrota mono apartenos al li.

Ne eblas por fremdulo precize kalkuli la nombron de boatoj viciĝantaj ĉe la bordo. Nur la estro de la kvina sekcio klare konas la nombron kaj ordon de la boatoj, eĉ la aspektojn de ĉiu boato kaj boatisto.

Li estas unuokululo. Oni diras, ke li faris mortigon en sia juneco kaj pro tio oni blindigis unu el liaj okuloj. Sed li estas eĉ pli kompetenta ol homo kun du okuloj. Ĉio sur la rivero submetiĝas al lia povo. Lia aŭtoritato super tiuj boatoj estas multe pli unueca ol tiu de la ĉina imperiestro super la tuta teritorio.

Kiam la rivero ŝvelas, la sekciestro ŝajne estas pli okupata ol ordinare. Li devas iri tien kaj ĉi tien por vidi, ĉu beboj en iuj boatoj ploras por havi mamnutradon kiam la gepatroj forestas, ĉu okazas kvereloj en aliaj boatoj kaj ĉu boatoj drivas pro senzorgemo. Krom tio, hodiaŭ li devas enketi pri krimoj okazintaj sur la bordo. Laŭ la polica aserto, tri raboj okazis dum la lastaj tagoj, sed oni trovas neniun spuron, kvankam ĉiuj fendetoj sur la tero estas traserĉitaj de tiuj honestaj oficistoj. Tial la traserĉa tasko falas sur liajn ŝultrojn. Li ricevis ordonon, donitan de la mensogema policejo, ke li traserĉu la boatojn kune kun armitaj policanoj noktomeze.

La direktivon li ricevis antaŭtagmeze, kaj li devas aranĝi multajn aferojn dum la tago. Unue li devas fari ion por tiuj, kiuj regalis lin per abunda manĝo en ordinaraj tagoj. Sekve li laŭiras la bordon kaj demandas ekde la unua boato, ĉu oni loĝigas suspektindajn fremdulojn tie.

La sekciestro estas despoto sur la akvo kaj konas ĉion sur la rivero: Li vivtenas sin per laboroj sur la akvo kaj staras kontraŭ la leĝo kaj loka instanco, kiu kutime servigas lin por trakti diversajn aferojn sur la akvo. Kun tempopaso li maljuniĝis, bonhaviĝis, edziĝis, ekhavis gefilojn, ekŝatis drinkadon kaj ekvivis komferte. Iom post iom, li sin turnis en paceman kaj justan homon. En la ofico li helpas la instancon, dum en sento li intimas al la boatistoj. En tio li

estas morala modelo. Oni portas al li respekton ne malpli grandan ol al ŝtatoficistoj, kaj li fariĝis kvazaŭ patro de multaj putinoj.

Nun li saltas de paŝtabulo sur nove farbitan boaton, ankranĉo ĉe la kvieta loko sub palafita lotussema butikio. Ĉar li konas la kliento-akceptanton de la boato, li, apenaŭ enpaŝinte en la boaton, ekvokas: “Filino la Sepa!”

Ne aŭdiĝas respondo, nek montriĝas juna virino; nek aperas maljuna mastrino. Opiniante, ke iu junulo estas faranta stultaĵon kun ŝi dum tago, li rigardas malproksimen kaj atendas sur la pruo.

Post momento, li vokas dufoje ŝian nomon, kaj poste la mastrinon kaj Udŭo-n. Udŭo estas servoknabino magra kaj akutvoĉa. Kiam plenkreskuloj forestas sur la bordo, ŝi gardas la boaton. Krome ŝi faras aĉetojn kaj preparas manĝojn. Ŝi ofte suferas de batado kaj estas plorema. Post tio, la sekciestro ankoraŭ ne ricevas respondon. Sed li aŭdas iun spiri en la kajuto, kaj li kredas, ke ne ĉiuj surbordiĝis, nek ĉiuj estas en sonĝo. Klinante sin al la aperturo de la kajuto, li demandas: “Kiu estas ene?”

Ankorau silento.

Kolereta, li laŭtigas sian voĉon: “Kiu tie?”

“Estas mi,” aŭdiĝas fremda vira voĉo kun hezito kaj timo, “ili ĉiuj surbordiĝis.”

“Ĉu vere?”

“Jes, vere. Ili...”

Por ne ofendi la alveninton, la viro sentas, ke li devas dece konduki al li, anstataŭ nur respondi lian demandon, sekve la viro elrampas el la mallumejo kaj, zorgeme kaptante la apogstangon de la boata tendo, li konfuze rigardas al la alveninto.

La viro ekzamenas lin de la piedoj ĝis la kapo: paro da grandaj porkledaj botoj ciritaj ŝajne per persimona oleo, mola siena monzono el ŝamo, krucataj brakoj kun ŝvelantaj vejnoj kaj flavetaj haretoj, granda ora ringo sur la fingro kaj fine kvadrata vizaĝo kvazaŭ el kunmetitaj pecoj de oranĝa ŝelo. Ĉe tio, la viro tuj komprenas, ke li estas grava kliento. Imitante la urbanan tonon, la viro diras: “Sinjoro, bonvolu eniri kaj sidiĝi, ili baldaŭ revenos.”

Laŭ liaj elparolo kaj amelita vesto la sekciestro scias, ke li estas kampulo ĵus veninta. Informiĝinte ke forestas la virinoj en la boato, li volus foriri, sed lin kaptas abrupte intereso pri tiu junulo, kaj li kaŭriĝas.

“De kie vi venas?” li demandas. Por ke la junulo ne timu, li rigardas lin kun patreca afableco. “Mi ne konas vin.”

Ankaŭ li ne havas impreson pri la kliento, kaj post ioma hezito, respondas:

“Mi alvenis hieraŭ.”

“Ĉu tritiko jam spikiĝas en via loko?”

“Tritiko? Nia tritiko antaŭ la akvorada muelilo, ha, niaj porkoj, ha, nia...”

La junulo subite konsciis, ke li ne trafis respondis, kaj ĉar li estas alparolanta dignan urbanon, li ne devas uzi tiujn vortojn “nia”, “la muelilo” kaj “porkoj”. Li ne povas daŭrigi la parolon.

Ridetante, li timeme rigardas al la sekciestro, kun peto ke tiu ĉi komprenu kaj pardonu lin.

La sekciestro komprenas tion. Kaj plie el la ĵusa konversacio, li sciigis, ke la junulo estas parenco de boatano, kaj demandas lin: “Kien iras la Sepa? Kiam ŝi revenos?”

Tiam la junulo fariĝas tre atenta en la respondado. Li ripetas la samon: “Mi alvenis hieraŭ, hieraŭ vespere.” Fine li eksplikas, ke la Sepa iras al templo por incensi kune kun la mastrino kaj Udŭo, restigante lin por gardi la boaton. Li ankaŭ diras sian identecon, ke li estas la edzo de la Sepa.

Ĉar Filino la Sepa kutime nomas la sekciestron patro kaj estas la unua fojo por li kvazaŭ patro konatiĝi kun la bofilo, tial sen invito de la junulo li restas kaj interŝanĝas kelkajn vortojn kun li, poste ambaŭ eniras en la kajuton.

Interne estas malgranda lito, sur kiu metiĝas bonorde falditaj silka kaj tola kovriloj kun ruĝaj desegnoj. Ĉiuj venintoj devas sidiĝi sur la litrando. Sunradioj enpenetras tra la aperturo kaj bone lumigas la kajuton, kiu tamen ŝajnas malhela vidate de ekstere.

Serĉante cigaredon kaj alumeton por la gasto, la junulo senatente renversas vazon, el kiu elruliĝas rondaj kaj brile brunaj kaŝtanoj disen en la heleta kajuto. Li pene kaptas kaj remetas ilin en la vazon. Li eĉ ne scias regali la gaston per io, sed la lasta senĝene levas kaŝtanon de sur la planko kaj krakmaĉas, laŭdante la bongustecon de la seka kaŝtano.

Vidante, ke la gastiganto ne manĝas kaŝtanojn, la sekciestro demandas: “Tre bongusta ili estas, ĉu vi ne ŝatas?”

“Mi ŝatas. Ili estas produktoj de la arbo malantaŭ mia domo. Lastjare la arbo abunde fruktis, kaj kaŝtanoj krake elsaltis el pikilhavaj grajnujoj. Mi vere ŝatas ilin.” Ridante, li diras tion kun ĝojo, kvazaŭ menciante pri sia filo.

“Tiel grandajn kaŝtanojn oni ne povas facile akiri.”

“Mi mem selektis ilin.”

“Vi mem?”

“Jes. Ĉar la Sepa ilin ŝatas, kaj mi ilin konservis ĝis nun.”

“Ĉu estas simi-kaŝtanoj en via vilaĝo?”

“Kiaj ili estas?”

Tiam la sekciestro komencas rakonti al la kampulo la rakonton pri simi-kaŝtanoj: Kiam simioj en montoj estis insultataj de preterpasantoj, ili ĵetis al tiuj ĉi kaŝtanojn kun la grandeco de pugno. La homoj, kiuj volis kaŝtanojn, iris en la montojn kaj intence incitis ilin per insultoj, tiel ili povis ricevi kaŝtanojn.

Pro la temo pri kaŝtanoj, la junulo, kiu suferas pro manko de taŭgaj vortoj por paroli, trovas sian simpatianton. Li do informas la sekciestron pri aferoj koncerne kaŝtanojn, okazaĵojn sub kaŝtanoj, novaĵo koncerne la loknomon de “Kastana Valo”, kaj fortikeco de plugiltenilo el kaŝtanligno. Vere li tre volas ŝancon por preparoli tiujn aferojn. Hieraŭ la tutan nokton, klientoj drinkadis kaj fumadis, dum li enfermis sin en la posta kajuto kaj babilis kun Udŭo, kiu tamen dormis profunde kiel porko; ĉi-matene li devus havi ŝancon paroli kun sia edzino pri la vilaĝaj aferoj, sed ŝi volis surbordiĝi por incensi al Budho kaj postulis, ke li sola gardu la boaton. Li atendis longe, sed neniu revenis, li iris sur la pobon por rigardi la riveran pejzaĝon, kio tamen nur pliiĝis lian melankolion. Antaŭ momento, kuŝante en la kajuto, li imagis, ke se lian vilaĝon inundus tiel granda rivero, certe sennombraj karpoj ĵetiĝus sur la bordon, kaj ke li tredus salikbranĉetojn tra la blankoj de la kaptitaj fiŝoj kaj sekigus ilin sub la suno, sed neniel povus nombri ilin precize. Subite la kliento eniris la boaton, kvazaŭ fortimigante ĉiujn fiŝojn.

Vidante ke la sekciestro ne ignoras liajn parolojn, la junulo profitas la bonan ŝancon por elverŝi al li ĉion kion li volus paroli kun sia edzino.

Li informas al la viro multon pri siaj hejmaj aferoj: la porkido nomata “trezoro” kun malbona temperamento, la muelilo ĵus riparita de ŝtontajlisto kaj ties anekdoto, kaj delonge perdita falĉileto neimagebla por la sekciestro.

“Kiel strange!” li rakontas. “Mi ĵuras, ke mi serĉis la falĉileton ĉie sub la lito, sur la pordlintelo, en grenejo, sed ne trovis. Pro tio mi eĉ riproĉis la Sepan, kaj ŝi ploris. Damninde, ĝi kuŝis en la rizaĵkorbo, kuŝis duonjaron, por manĝi rizaĵon! Ĝi terure rustis. Kiel damninda ĝi estas! Ĉu vi komprenas kion mi diras? Kial ĝi kuŝis en la rizaĵkorbo duonjaron? La korbo estis senutilaĵo pendantsur la fenestra framo. Laŭ mia memoro, kiam mi akriĝis bambupecon per tiu falĉileto, ĝi vundis kaj sangigis mian manon, mi forte ĵetis ĝin kun furiozo... Poste mi ĝin trovis kaj akriĝis. Ĝi pruvis sin ne malbona. Se vi ne estas atentema, ĝi povas vundi kaj sangigi vin refoje. Mi ankoraŭ ne diras tion al la Sepa. Ŝi neniel forgesos, ke ŝi maldolĉe ploris pro ĝi. Trovita, ha, ha, ĝi estas vere trovita!”

“Bone, ke vi trovis ĝin.”

“Certe bone, ĉar tio forigis mian suspekton, ke ŝi faligis ĝin en la rivereton, sed hontis konfesi tion. Mi eksciis, ke ŝi ne trompis min. Mi komprenas, ke ŝi estis maljuste traktata, ĉar mi diris: ‘Se vi ĝin ne trovos, mi vin batos!’ Sed fakte mi neniam batis ŝin. Tamen mia kolero estis tiel terura, ke ŝi ploradis la tutan nokton.”

“Ĉu vi uzas ĝin por falĉi herbojn?”

“Ho, multe pli da utilecoj ĝi havas. Ĝi estas tre delikata kaj malgranda. Kial nur por falĉi herbojn? Vi povas uzi ĝin por senŝeligi batatojn, skrapi fluton kaj tiel plu. Ĝi kun akra klingo kostas tri cent monerojn. Ni ĉiuj devas havi ĉe ni tian serpeton, ĉu vi komprenas?”

“Jes, mi komprenas, ke ni devas havi ĝin,” respondas la sekciestro. Ŝajnas al li, ke la sekciestro vere komprenas lin, kaj li diras al li ĉion, eĉ sian esperon, ke ŝi naskos bebon en la venonta jaro, la esperon nur taŭgan por diri al sia edzino en la lito. Dum la babilado, la junulo senĝene uzas multajn krudajn kaj stultajn vortojn. Post longtempa konversacio, la sekciestro stariĝas por adiaŭi, nur tiam la junulo rekonsciiĝas, ke li devas demandi la gaston pri lia nomo.

“Sinjoro, bonvolu diri al mi vian nomon, ke mi informu ŝin pri via alveno.”

“Vi diru al ŝi, ke venis altkreskulo en ledaj botoj, kaj ke ŝi ne akceptu alian klienton, mi revenos ĉi-vespere.”

“Ŝi ne akceptu alian klienton, vi revenos?”

“Jes, tiel diru. Mi certe revenos. Mi ankaŭ invitos vin al drinkado. Ni ja estas amikoj.”

“Jes, ni estas amikoj.”

Ekfrapinte la junulon je la ŝultro per sia grasa kaj dika mano, la sekciestro surbordiĝas for de la pruo kaj eniras en alian boaton.

Post foriro de la sekciestro, la junulo atendas kaj penas diveni la identecon de la viro. Ja estas unuafoje por li interparoli kun tiel digna persono, kiu donis al li bonan, neforgeseblan impreson. Hodiaŭ la dignulo ne nur konversaciis kun li, sed eĉ nomis lin amiko kaj invitis lin al drinkado. Li supozas, ke li certe estas konstanta kliento de la Sepa kaj ŝi certe ricevis de li multe da mono. Li sentas subitan ĝojon kaj deziron kanti. Kaj li ekzumas popolkanton: “La rivero ŝveligas, kaj karpoj sur la bordojn alsaltas, la grandaj kiel sandalegoj, kaj etaj kiel sandaletoj.”

Kelka tempo pasis, sed eĉ la ombro de la Sepa ne aperas. Li denove



ekrememoras la agmanieron de la altkreskulo, kaj kredas, ke la paro da brilaj botoj ne aspektus tiel decaj kaj altiraj, se ili ne estus ciritaj per persimona oleo. Kaj li ne povas klarigi al si mem, kiom kostas tiu dika ora fingroringo kaj kial tiu trezoro tiel plaĉas. Tiu granda viro, li pensas, kondukis kiel revizoro aŭ altranga oficiro, li — monprovizanto de la Sepa! Nereteneble li ekzumas alian kanton.

Tagmezo alvenas. Oni preparas manĝon en aliaj boatoj. Malsekaj lignoj malfacile bruligeblas, kaj la larmiga kaj terniga fumo kuras ĉien kaj ŝvebas super la akvo kiel silko. El la restoracio sur la bordo aŭdiĝas tintado de kuiriloj, kaj el la najbara boato aŭdiĝas fritado de legomo en pato, sed la Sepa ankoraŭ ne revenas. En la pobo, li trovas rizujon. Li lavas rizon per malpura riverakvo ĉerpita per latuna pelvo por prepare manĝon. Tamen li ne lertas en bruligo de malsekaj lignoj kaj longe ne sukcesas hejti la malvarmegan fornion. Li povas fari nenion alian ol lasi tion.

Estas tempo por tagmanĝo. Li sentas malsaton. Sidante surtabureto, li frapetas la boatplankon kaj devigas sin pensi ion. Kiam la aroganta zono plena je monbiletoj reaperas antaŭ liaj okuloj, li perdas trankvilecon kaj estas kaptita de neobeema penso. En lia impresio, tre abomeninda fariĝas la kvadrata vizaĝo kun oranĝa haŭto kaj ruĝa nazo sur si. Cetere, kion utilas lia rememoro pri tiuj vortoj diritaj antaŭ ŝia edzo? “Ĉi-vespere ŝi ne akceptu alian klienton, mi revenos.” Tiuj damnindaj vortoj eliĝis krude el tiu buŝego! Kial li diris tion? Ĉu li rajtis tion diri!...

La penso pliigas lian koleron, kaj malsato ŝiradas lian indignant koron. En tiu simpla junulo, kreskas senĉese sentimentoj ne mankantaj al prahomoj.

Li ne povas zumi kanton plu. Lia gorĝo estas premegata de ĵaluzo, kaj nenia kanto povas flugi el ĝi. Nenian ĝojon li sentos plu. Kiel honesta agrokulturisto, li volas reveni hejmen morgaŭ.

Kun malbona humoro li des pli ne povas bruligi la fornion kaj ĵetas ĉiujn brullignojn en la riveron.

“Diablo prenu tiujn brullignojn! Ili flosu en maron!”

Tamen tiuj brullignoj estas elakvigitaj de homo sur alia boato dudek futojn fora. Ŝajne la homo estas atendanta alflosantajn brullignojn. Apenaŭ li elakvigas la malsekajn brullignojn, li ekbruligas pecon da eluzita kanaba ŝnurego kiel ekbruligilon. La fumo tuj plenigas la tutan boaton, kaj la fajro en la forno kraketas kaj ekbrulas arde. Vidinte tion, la junulo sentas plian indignon kaj honton kaj decidas hejmeniri anstataŭ atendi ilian revenon.

Ĉe la fino de la strato, li renkontas sian edzinon kaj Udŭo-n, kiuj mano en mano preskaŭ eliras el la strato. Udŭo tenas dukordan muzikilon tute novan, kiun li ne vidis eĉ en songo.

“Kien vi iras?”

“Mi — volas reveni hejmen.”

“Anstataŭ gardi la boaton, vi volas reveni hejmen. Kiu ofendas vin? Kiel kolerema vi estas!”

“Mi volas hejmeniri, lasu min reveni hejmen.” “Revenu en la boaton!”

La mieno de edzino estas eĉ pli severa ol tiuj vortoj. Kaj krome li scias, ke la dukorda muzikilo estas aĉetita speciale por li, li do cedas. Palpante sian brulan fruntan, li murmuris: “Bone, mi revenu en la boaton.” Kaj sekvante sian edzinon, li returnas sin al la boato.

Ankaŭ la maljuna boatmastrino alrapidis kun paro da porkaj pulmoj en la mano. Ŝi anhelas kun brulaj vangoj, kvazaŭ ŝi ŝtelus ĝin kaj timus persekutadon kaj arestadon. Apenaŭ ŝi estas enboatiĝinta, aŭdiĝas voĉo de la Sepa:

“Onjo, mia edzo insistas pri hejmeniro!”

“Pro kio? Li hejmeniros sen spekti teatraĵon?”

“Ni vidis lin koleranta ĉe la stratfino. Li certe kulpigas nin pri la malfrua reveno.”

“Mi estas kulpa pri tio; ankaŭ la bodisatvo kulpas, kaj la buĉisto kulpas. Mi ne devus kvereli longe kun la buĉisto pro unu monero kaj li ne devus plenigi la porkajn pulmojn per tiom da akvo.”

“Tio estas mia kulpo,” diras ankaŭ la virino en la kajuto. Ŝi sidiĝas vidalvide al sia edzo. Kiam ŝi ŝanĝas siajn vestojn, ŝi intence montras sian koketan korseton el ruĝa sateno.

Rigardante ŝin, la viro restas senparola. La neesprimebla pasio impetas en lia sango.

Sur la pobo, la onklino kaj Udŭo laŭte parolas pri brullignoj kaj rizo.

“Ho, kiu ŝtelis niajn brullignojn?”

“Kiu lavis la rizon?”

“Certe, la lignoj ne estas bruligeblaj... Kiel vilaĝano, la bofrato nur kapablas bruligi rezinriĉajn lignojn, sed ne niajn malsekajn.”

“Hieraŭ ni ja malligis faskon da brullignoj, ĉu ne?”

“Neniom restas.”

“Lasu, alportu alian faskon.”

“La bofrato tamen scipovas lavi rizon!”

Aŭskultante la interparolon, la junulo senvorte sidas en la kajuto kaj fikse

rigardas la novan dukordan muzikilon.

“La kordoj estas jam agorditaj. Provu ĝin,” diras lia edzino.

Unue li silentas, poste metas la muzikilon sur sian genuon kaj ekzamenas rezinaĵon. Dum agordado, obtuzaj sonoj elglitas tra liaj fingroj, kaj rideto ludas ĉirkaŭ lia buŝo.

Post momento, fumo plenigas la tutan kajuton. La edzino elvokas lin kaj tiu eliras kun la muzikilo kaj akordigas la kordojn sur la pruo.

Dum la tagmanĝo, Udŭo diras: “Bofraĉjo, mi kantos kaj vi akompanos min per la muzikilo post la tagmanĝo.”

“Mi ne scipovas ludi.”

“Vi ne diras la veron. Mi aŭdis vin ludi tre bone.”

“Mi ne trompas vin.”

“Mi aŭdis de la Sepa, ke vi ludas bone,” diras la maljunulino, “kiam mi vidis ĉi tiun muzikilon ĉe la templo, mi proponis aĉeti ĝin por vi. Feliĉe, ke ĝi estas malkara. Oni probable devas pagi pli ol unu jŭanon por ĝi en via vilaĝo, ĉu ne?”

“Jes. Kiom ĝi kostas?”

“Cent sesdek kuprerojn. Oni diris, ke ĝi estas prezo inda.”

“Kiu diris tion?” demandas Udŭo.

“Knabinaĉo, kiu ne diris tion?” diras kolerete la onklino.

La muzikilo estas senpage donacita de iu konata muzikilvendisto, tial, aŭdinte la mensogon de la onklino, Udŭo faris la demandon, dum la Sepa ekridis. Ankaŭ la viro, supozante ke ŝia rido celas al la mallerta parolo de la maljunulino, seke ridetas.

Finmanĝinte la unua, la viro komencas ludi la instrumenton, kiu eligas klarajn kaj sonorajn sonojn. Demetinte siajn manĝilojn, Udŭo ekkantas. La maljunulino ekbatas ŝin sur la kapon per siaj manĝbastonetoj, kaj la lasta haste finas sian manĝon, forportas la manĝilarojn kaj iras lavi ilin.

Vespero falas. En la antaŭa kajuto kovrata de tendo, la viro ludas muzikilon, dum Udŭo kaj la Sepa kantas. La kerosena lampo kun ŝirmilo el ruĝa papero karmine lumigas la tutan kajuton kvazaŭ nupto okazus tie. En ĝoja bruo, la junulo dronas en ekstazo, kvazaŭ dum novjara festotago.

Aŭdinte la kantadon, du preterpasantaj ebriiĝintaj soldatoj ŝancelpaŝe proksimiĝas al la boato. Ili forte kaptas la stevenon per siaj kotoplenaj manoj kaj balbute krias: “Kiu kantas? Anoncu vin! Bone, bone, mi donos al vi kvincent monerojn! Ĉu vi ne aŭdas? Kvincent!”

La muzikilo subite silentiĝas, kaj regas kvieto.

La ebruloj piedfrapas la boaton kaj aŭdigas obtuzajn kaj pezajn batojn kontraŭ la boato. Palpsercante la kunigan lokon de la tendo, ili intencas ĝin puŝmalfermi.

“Ĉu vi ne volas mian rekompencan? Bastardoj! Mutuloj! Surduloj! Kiuj aŭdacas distriĝi ĉi tie! Kiun mi timas? Eĉ imperiestron mi ne timas. Se mi timas imperiestron, mi ne estas kalkulata kiel homo!...”

Alia raŭka voĉo diras: “Putinaĉo, helpu min enboatiĝi!”

Tuj aŭdiĝas frapiĝoj de ŝtonoj kontraŭ la tendo kaj blasfemoj. Ĉiuj en la boato konsterniĝas. Iom malpligrandiginte la lampolumon, la maljunulino iras puŝmalfermi la tendon. Timigite de la minaca voĉo, la viro enŝovas sin en la malantaŭan kajuton kun la muzikilo en la mano.

Post momento, la ebruloj eniras la antaŭan kajuton kaj, blasfemante, hastas kisi la Sepan, maljunan onklinon kaj Udŭo. Ili demandas: “Kiu kantis ĉi tie? Venigu la ludanton de la muzikilo, ke li prezentu al ni.”

La maljunulino aŭdigas nenion pro timo, kaj ankaŭ la Sepa havas nenian kontraŭrimedon. Ambaŭ ebruloj plengorĝe kriaĉas:

“Mil diabloj! Venigu lin ludi por mi, kaj mi rekompencos per mil, mil batatoj! Eĉ la plej granda malavarulo ne povas pagi tiom multe! Rapide elvenigu lin, alie mi bruligos vian boaton! Maljunulinaĉo, ĉu vi aŭdas? Rapidu kaj ne kolerigu nin. Alie ni pardonos neniun!”

“Via sinjora moŝto, nur miaj familianoj ludis ĉi tie, ne...”

“Ne? Ne? Ne? Maljuna putinaĉo, vi maljuniĝas kaj ne estas bongusta. Rapide venigu la ludanton! Bastardo! Mi volas ludi muzikilon kaj kanti mem!” Dirante, li stariĝas kaj iras al la malantaŭa kajuto por traserĉi. La maljunulino konsterniĝas kaj gape staras. Maltrankvila, la Sepa kaptas la manon de la ebrulo kaj metas ĝin sur sian grandan mamon. Li komprenas kaj sidiĝas. “Bone, bone, mi povas pagi. Ĉi-nokte mi dormos ĉi tie!”

Li kuŝiĝas ĉe la maldekstra flanko de la Sepa, kaj la alia senvorte kusiĝas ĉe la dekstra.

Aŭdinte, ke la antaŭa kajuto iom kvietiĝas, la junulo mallaŭte vokas la onklinon trans la septo. La onklino sentanta grandan ofendiĝon alrampas, li ankoraŭ ne scias pri la okazintaĵo.

“Kio okazis?”

“Du soldatoj ebriiĝis kiel ursoj. Ili foriros baldaŭ.”

“Ili devas foriri. Mi forgesis sciigi vin, ke hodiaŭ alvenis homo kun granda kvadrata vizaĝo, ŝajne altrangulo. Li diris al mi, ke li venos ĉi-nokte kaj

neniu kliento estas permesata resti ĉi tie.”

“Ĉu li estas en ledaj botoj kaj lia voĉo sonas kiel gongo?”

“Jes. Jes. Kaj li portas pezan oran ringon sur la fingro.”

“Li estas kvazaŭpatro. Ĉu li venis hodiaŭ matene?”

“Jes. Ni babiladis longan tempon. Li ankaŭ ĝuis kaŝtanojn.”

“Kion li diris?”

“Li diris, ke li certe venos kaj ni ne akceptu aliajn klientojn... kaj ke li invitos min al drinkado.”

Ŝi pensas: Ĉu la sekciestro mem venos nokti? Ĉu li volas ŝin, maljuna kun maljuna? Ĉu li rimarkas...? Ŝi neniel povas trovi la respondon. Kiel maljuna prostituistino, ŝi jam spertis ĉiajn malhonoraĵojn kaj neniam ruĝiĝas de honto. Sed kiam la soldato diris, ke ŝi ne bongustas, ŝi iel sentis honton kaj ofendiĝon. Ŝi senbrue revenas en la antaŭan kajuton kaj, vidante la maldecaĵon tie, ŝi elŝovas sian langon. “Virhundoj!” Ŝi insultas kaj reiras al la malantaŭa kajuto.

“Kio?”

“Nenio.”

“Ĉu ili foriras?”

“Ne. Ili dormas.”

“Dormas...?”

Kvankam la maljunulino ne povas klare vidi lian mienon, tamen ŝi komprenas lin el lia tono. Ŝi diras: “Bofrato, nun ni povas surbordiĝi por nin amuzi. Ĉi-nokte oni prezentos la teatraĵon *Ĉiŭhu Priŝercas Sian Edzinon Trifoj*. Mi invitas vin al spektado en loĝio.”

La viro senvorte skuas sian kapon.

Post foriro de la soldatoj, Udŭo, onklino kaj la Sepa gaje parolas, mokante la ebriecon de la soldatoj en la antaŭa kajuto lumigata de la kerosena lampo. La viro restas en la malantaŭa kajuto kaj ne eliras. Vokinte lin dufoje ĉe la pordeto, la onklino ne ricevas respondon kaj ne scias, pro kio li koleras. Poste ŝi ekzamenas la desegnaĵojn sur la kvar monbiletoj, kiujn la soldatoj pagis. Nun ŝi jam scipovas distingi la verajn monbiletojn disde la falsaj kaj konstatas, ke tiuj kvar estas veraj. Sub la lampo, ŝi montras al la Sepa la desegnaĵojn kaj markojn sur la monbiletoj. Flarinte bovolean odoron, ŝi certiĝas, ke tiuj monbiletoj venis el islama restoracio.

Udŭo duafoje vokis: “Bofraĉjo, bofraĉjo, ili jam foriris. Ni daŭrigu la kantadon. Ni devas...”

Kvazaŭ ekpensis ion, la Sepa haltigas Udŭo, ke ŝi silentu.

Silento. Unue la viro en la malantaŭa kajuto pinĉetis la kordojn, sed nun liaj fingroj jam forlasas ilin.

Alflugas sonoj de tamtamado, gongado kaj blovinstrumentoj el la apudrivera strato, kie komercisto festas ion. Gastoj venas por gratuli kaj teatraĵo prezentiĝas en la korto. Tia spektaklo certe daŭros la tutan nokton.

Post momento, la Sepa katpaŝe enrampas en la malantaŭan kajuton, sed baldaŭ revenas.

“Kio okazas al li?” demandas la onklino. Skuante sian kapon, la Sepa vespiras.

Konsiderante ke la sekciestro probable ne venos, ili enlitiĝas, tri inoj en la antaŭa kajuto kaj la viro en la posta.

Noktomeze, la sekciestro alkondukas la patrolon. Regas morta silento. Kvar armitaj policanoj gardstaras sur la pruo, la sekciestro kaj patroloficiro eniras la antaŭan kajuton kun lumigita elektra torĉo. Tiam la maljunulino jam pliheligis la lampon, komprenante ke nenio grava okazos. La Sepa, sidante sur la lito kun vesto pendanta sur siaj ŝultroj, salutas sian kvazaŭpatron kaj la sinjoran moŝton kaj ordonas Udŭo prepari teon. Tiam tiu ĉi ankoraŭ ravas sin per la sonĝo, ke ŝi plukas fragojn en la kamparo.

La maljuna virino puŝvekas kaj venigas la junulon antaŭ la sekciestron kaj grandulon en nigra uniformo. Li mutiĝas de timo, ne sciante, kio okazas.

“Kiu li estas?”

“La edzo de la Sepa. Li ĵus venis de la kamparo,” la sekciestro respondas anstataŭe.

“Li venis nur hieraŭ, via sinjora moŝto,” diras la Sepa.

La oficiro ekzamenas jen la viron jen la virinon kaj diras nenion, konstatante ke la sekciestro ne mensogas. Ili malserioze traserĉas la antaŭan kajuton. Kiam ili rimarkas la vazon kun kaŝtanoj, la sekciestro prenas el ĝi plenmanon da kaŝtanoj kaj enŝovas en la poŝegon de la deca uniformo de la oficiro. Kaj la lasta nur ridetas.

Momenton poste tiu aro transiras en alian boaton. Apenaŭ la maljunulino volas fermi la tendon, policano revenas:

“Sinjorino, informu la Sepan, ke nia ĉefo revenos por ŝin ekzameni zorgeme. Ĉu vi komprenas?”

“Jes, jes, mi komprenas. Ĉu baldaŭ?” diras la maljunulino.

“Li revenos tuj post traserĉado de aliaj boatoj.”

“Ĉu vere?”

“Ĉu mi iam mensogis?”

La viro miras, vidante la ĝojan mienon de la maljunulino, ĉar li ne komprenas, kial la oficiro revenos por ekzameni lian edzinon denove.

Sed, kiam li vidas sian edzinon sidanta sur la lito, lia antaŭa kolero jam forvaporigās, kaj li deziras repaciĝi kun ŝi kaj interkonsiliĝi kun ŝi pri kelkaj aferoj. Li do sidiĝas sur la litrandon.

La maljunulino klare konas la viron, ties pasion kaj naivecon, tial ŝi nur atentigas al la Sepa: “La oficiro baldaŭ revenos.”

Kunpremante siajn lipojn, la lasta stuporiĝas dum longa tempo. Frumatene, la viro ellitiĝas kaj volas foriri. Li senvorte ordigas siajn sandalojn kaj trovas sian piron. Ĉio estas preta. Li sidas senvorta sur la litrando, kvazaŭ kaŝante ion en la koro.

Lia edzino demandas: “Hieraŭ vespere vi jam promesis al mia kvazaŭpatro, ke vi tagmanĝos ĉe li hodiaŭ, ĉu ne?”

“...”

Anstataŭ respondi, li nur skuas la kapon.

“Li preparas abundan tagmanĝon speciale por vi!”

“Ĉu vi ankaŭ ne volas spekti teatraĵon?”

“La vaporumitaj grasaj pasteĉoj, kiujn vi tre ŝatas, ne vendiĝos ĝis tagmezo. Ĉu vi ne volas?”

“...”

Lia edzino embarasiĝas pro lia insisto. Ŝi eliras sur la pruon kaj staras momenton tie. Poste ŝi revenas kaj elpoŝigas kvar monbiletojn, kiujn la soldatoj pagis la lastan nokton, kaj enŝovas ilin en la maldekstran manon de sia edzo. Tiu ĉi diras nenion. Ŝajne ŝi subkomprenis ion kaj diras: “Onjo, donu al mi tiujn tri. ” La maljunulino elprenas la monbiletojn, kaj la Sepa ilin enŝovas en lian dekstran manon.

La viro skuas sian kapon kaj disŝutas la monbiletojn teren. Kovrante la vizaĝon per ambaŭ grandaj kaj kalaj manoj, li esploras kiel infano.

Udŭo kaj la maljunulino retiriĝas en la postan kajuton. Rigardante la dukordan muzikilon pendantan sur la trabeto de la kajuto, Udŭo deziras kanti, sed neniel sukcesas eligi soneton. Ŝi pensas en si, kia strangaĵo, ke eĉ plenkreskulo ploras.

Kiam la sekciestro venas inviti lin, li vidas nur la maljunulinon kaj Udŭo en la boato. De la maljunulino, li informiĝas, ke ambaŭ geedzoj jam hejmeniris.